

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5

Oktobro/Novembro/Decembro 1983



27. GEFA-Jahresversammlung

vom 7. – 9.10.1983 in Lüneburg



Foto: Ritterspach

Harmonia jarkunveno de GEFA en Lüneburg

Sian 27an postmilitan jarkunvenon okazigis la Germana Esperanta Fervoja Asocio (GEFA) inter la 7a kaj 9a de Oktobro 1983 en Lüneburg. La inviton sekvis 125 geamideanoj, inter ili reprezentantoj el ses eksterlandaj asocioj.

Lüneburg, la iama Hansa-urbo, riĉiĝinta pro sia longtempa salproduktado, ofertas sin al siaj gastoj kiel mezepoka juvelo. En la gotika urbdomo kun sia barokstila fasado s-ro Schlawatzki por la malhelpita urbestro akceptis kaj afable regalis sesdekon da kongresanoj vendredon

posttagmeze. Liaj bonvenigaj frazoj grandparte en Esperanto skizis ankaŭ la historion kaj nuntempan situacion de la urbo.

Escepte de kelkaj malfrue aliĝintoj loĝis la kongresanoj en la moderna hotelo

Seminaris. Tie troviĝis la akceptejoj, riĉe ekipita librostando el Paderborn kaj kompreneble ĉiuj necesaj salonoj. Sen hasto kaj organizaj mankoj la diversaj programeroj disvolviĝis. Dum la estraro de GEFA pritraktis aktualajn temojn, la aliaj ĝuis la vesperon konsumante la iom tro kostajn trinkaĵojn. Amikoj de laŭta muziko vizitis la hotelan koktelejon. La akceptejoj ĝisnokte elliveris kongresdokumentojn al la malfrue alvenintoj.



La plej gravaj helpantoj laboras

Sabaton, jam frumatene, oni renkontis en la najbara hela naĝejo, cetera senkoste uzebla por la hotelgastoj, kelkajn kuraĝajn GEFA-anojn. La plimulto kontraŭe fininte sian matenmanĝon pere de apuda bufedo kolektiĝis por la aŭtobusvizito al la urbokerno. Bedaŭrinde ekpluvis, kaj malvarmeo memoriĝis pri la aŭtuno, sed ĉiuj returnis laŭdante la ravecon de la pitoreskaj konstruaĵoj. Por la oficialuloj la antaŭtagmezo preskaŭ ne sufiĉis por trakti en la laborkunsido la multnombrajn temojn. Kun certa rezignacio estis konstateble, ke la poresperanta laboro en la distriktoj ne alportis la deziritan sukceson. Pro la manko de veraj kunlaborantoj fariĝas eĉ problemoj trovi posteulojn por tiuj, kiuj iom post iom devos retiriĝi el estraraj taskoj. Traktitaj estas ankaŭ la venontaj kongresoj de IFEF kaj UEA. GEFA kunvenos 1984 en Bad Honnef kaj 1985 verŝajne en Lichtenfels. Kontentigaj estis la informoj pri la terminara laboro kaj la aperonta Historio-Broŝuro de IFEF.

Posttagmeze startis du plenplenaj aŭtobusoj, ne al veturado tra la lüneburga erikejo laŭ konata popolkanto, sed al vizito de du tute diferencaj vidindaĵoj. Unu celo estis la iama monaĥinejo Lüne

konstruita en la 14a jarcento en nordgermana gotika stilo. La gvidantino verve ilustris la historion, precipe la malkomfortan vivon de la monaĥinoj en la malvarmaj ĉambroj kaj ĉeloj. Nuntempe vivas tie evangeliataj noblulinoj. Eksterordinare bela estas la preĝejo kun sia gotika altaro kaj precioza orgeno. Ĝi servas ankoraŭ al regulaj diservoj.

En proksima restoracio la iom malvarmiĝintaj ekskursanoj konsumis kafon kaj bongustan torton, antaŭ ol ili promenis al la apuda giganta liftkluzo por ŝipoj. En speciala informejo la vizitantoj aŭdis kaj vidis pere de modeloj, kiel la liftkluzo funkcias por superi la 38-metran niveldiferencon en la Elboflanka Kanalo. Kiu kuraĝis suprengrimpi en la liftkluzo konstruaĵo, povis observi la teknikan proceduron. Bedaŭrinde ne regis la tradicia bela GEFA-vetero, sed almenaŭ ne pluvis. Tre utila estis cetera la esperantlingva informilo pri la liftkluzo kiel ankaŭ la priskribo de Lüneburg aldonita al la kongresdokumentoj, ambaŭ prizorgitaj de Gernot Ritterspach.

Kulmino de la jarkunveno estis la vespero. Inter la feste vestitaj kongresanoj oni vidis ankaŭ reprezentanton de GEA (Hirsch) kaj gesinjoroj Bormann. Post la malfermo distriktkomisiito Böhnke kaj GEFA-prezidanto Giessner bonvenigis ankaŭ nome de la ĉefestraro de la Sociala Organizo ĉiujn ĉeestantojn, inter ili eksterlandajn gastojn el ses landoj kaj la kompletan estraron de la Internacia Fervoja Esperanto-Federacio (IFEF). Giessner akcentis la noblajn celojn kaj la valoron de la Internacia Lingvo por esperantistaj fervojistoj.

Por la Sociala Organizo en la fervoja distrikto Hamburg s-ro Wunsch transdonis la bondezirojn. Kiel amikaj esperantistoj esprimas siajn salutojn, pruvis la alparolo de s-ro Engen (Norvegio), vicprezidanto de IFEF, la gaja s-ro Geroldinger por Aŭstrio, s-ro de Sutter (Belgio), kiu kun sia edzino estis organizinta la lastan IFEF-kongreson, s-ro Hauge por Danlando, s-ro Bultmann por Nederlando, s-ro Krogstie por Norvegio kaj s-ro Bengtsson por Svedio. Ili ĉiuj laŭdis la ĉarmon de la gastiganta urbo kaj la modelan organizadon de la jarkunveno. Simile esprimis sin gastoj el la Germana Demokratia Respubliko.

La vicon de la alparolantoj agrable interrompis konataj kantoj el la operoj „La perliŝistoj“ de Bizet, „La barbiro de Sevilla“ de Rossini, „La potenco de l' sorto“ de Verdi, „Don Giovanni“ de Mozart, „La gajaj virinoj“ de Nicolai kaj „La vendita fianĉino“ de Smetana. Laŭdindaj estis ne nur la diversnacieco de la komponistoj, sed ankaŭ la altkvalita prezentado per s-roj Hoffmann (tenoro) kaj Lange (baso). Ilin akompanis lerte per piano s-ino Bode. Por kompletigi tiun muzikan ĝuon, la aŭskultantoj ricevis presitajn tekstojn trafe tradukitajn de la GEFA-prezidanto.



Dum la festvespero

ambaŭ fotoj: Smolič

Jam dum la tiujara IFEF-kongreso en Belgio la ĉiam ideoriĉa s-ino Kruse estis stimulinta la germanajn inojn kolekti taŭgajn donacojn destinotajn por tombolo, kies profito helpu financi la eldonon de la IFEF-historio. La rezulto estis pozitiva. Ĉiuj lotoj vendiĝis, kaj abundis je gajnitaj objektoj. Rezultato: 700 GM.

Post tiu oficiala parto de la festvespero la muzikistaro „Winni's Band“ invitis eĉ la plej aĝajn grizharulojn al plurhora dancado sur glata parkedo. Agrabla aspekto el la vido de la malmultaj sidantoj. Laŭdire la lastaj gastoj forlasis la hotelan koktelejon nur frumatene.

La dimanĉan matenon la plej multaj kongresanoj kolektiĝis denove en salonego, kiu estis transformiĝinta kiel filmt teatro. S-ro Barnickel ofertis per sia sonfilmo retrorigardon pri la lasta IFEF-kongreso. Kelkiuj rekonis sin mem. Ankoraŭfoje aŭdiĝis la sonorilaroj de la vizititaj flandraj urboj. La sekva filmo de la sama aŭtoro prezentis Augsburg, la urbon de la UK 1985. La vidindaĵoj en la urbo kaj la ekskursaj celoj espereble instigos al

multnombra partopreno. Krome estis prezentitaj du mallongaj, sed tre instruaj fakaj filmoj de la Germana Federacia fervojo ekz. pri la grandega manovra stacio Maschen sude de Hamburg, kiu estas ekipita per la plej modernaj instalaĵoj por vartrajnoj. Inter la filmoj oni kantis pere de disdonitaj tekstoj kaj vigla harmonikisto.

GEFA-prezidanto Giessner donis koncizan raporton pri la agado en la asocio dum la pasinta jaro. Li ankaŭ ne forgesis memori pri la relative granda nombro de la mortintoj kaj apelaciis al konstanta kunlaboro, kiu nepre necesas por paciĝi la mondon kaj redukti la televidan konsumon. Kun laŭdo estas menciita la sukcesplena ekzameno de s-ino Karin Lencki en la kadro de la jarkunveno. Estas donitaj ankaŭ informoj pri la venonta IFEF-kongreso en Bulgario.

Preskaŭ ĉiuj prenis la ekskvizitan bufedan tagmanĝon (anglalingve „brunch“), antaŭ ol ili rovojaĝis hejmen, kredeble kontentaj kaj plenaj de novaj impresoj. La IFEF-estraro eluzis la okazon por sekva kunsido. Dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis al la sukceso de la 27a jarkunveno de GEFA - kaj ĝis revido venontjare en Bad Honnef, distrikto Köln (12a ĝis 14a de Oktobro 1984).

W. B.

Im herbstlichen Lüneburg

Die Jahresversammlung, alljährlich das wichtigste Ereignis der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (GEFA), fand vom 7. bis 9. Oktober 1983 in der alten Hansestadt Lüneburg statt. Für die Unterbringung und den äußerlichen Ablauf war das Hotel Seminaris gewählt worden, das alle Voraussetzungen für die 27. Tagung nach dem Krieg bot.

Die Stadt empfing im altherwürdigen Rathaus bereits am Freitag die bis dahin angereisten Teilnehmer. Am Samstag Vormittag beriet sich der GEFA-Vorstand mit den Bezirksbeauftragten, während die meisten anderen bei kühlem Wetter die Sehenswürdigkeiten des mittelalterlichen Stadtkerns besichtigten. Auch eine Sprachprüfung wurde abgenommen und bestanden. Im Foyer des Hotels stieß ein gut ausgestatteter Bü-

cherstand leider nur auf geringes Kaufinteresse. Der nachmittägliche Busausflug führte zum gotischen ehemaligen Benediktinerkloster Lüne sowie zum riesigen Schiffshebewerk am Elbe-Seitenkanal.

Am Festabend begrüßte Herr Wunsch vom BSW-Bezirksvorstand Hamburg die 125 Teilnehmer. GEFA-Vorsitzender Gießner hob den Wert der Internationalen Sprache zur Überwindung der Verständigungsschwierigkeiten, auch unter Eisenbahner-Kollegen, hervor. Vertreter der IFEF-Landesverbände in Belgien, Dänemark, Niederlande, Norwegen und Österreich überbrachten ihre Grüße und Glückwünsche. Auch aus der DDR waren Sprachfreunde anwesend. Besonders hervorzuheben ist die Anwesenheit des gesamten IFEF-Vorstands. Gesangsbeiträge in Esperanto aus bekannten Opern bereicherten das

Abendprogramm. Eine reich bestückte Tombola fand großzügigen Widerhall. Ihr Ergebnis sichert die Herausgabe der Geschichte von IFEF. Für den anschließenden Tanzabend bis weit nach Mitternacht sorgte eine fleißige Band. An der sonntäglichen Matinee wurden Tonfilme über den letzten IFEF-Kongreß in Belgien, den künftigen UEA-Kongreß in Augsburg, sowie über den Rangierbahnhof Maschen geboten. Zwischendurch sang man Volkslieder in Esperanto. Der GEFA-Präsident gab einen Überblick über die Ereignisse des Jahres 1982 und lud alle zur zahlreichen Teilnahme am IFEF-Kongreß 1984 in Bulgarien, sowie zur 28. Jahresversammlung vom 12.-14.10.84 in Bad Honnef, BD Köln, ein. Für das gut gelungene und harmonisch abgelaufene Herbsttreffen sei Herrn Böhnke und seinen Helfern recht herzlich gedankt.

W. B.

Jarraporto pri la periodo de la 26a ĝis la 27a jarkunvenoj (1982/83)

Enkonduko

Ĉi-jare la morto denove postulis sian parton. Ni perdis por ĉiam jenajn membrojn:

Ing. Erwin Böhm (70) Frankfurt, 12.6.82
Wilhelm Söhngen (68), Kassel, Oktober 82
Franz Scherak, Nürnberg, 17. 12. 82
Gerhard Bardenhorst (79) kaj
Frieda Bardenhorst (61), Nordhorn, 15.4.83
Friedrich-Wilhelm Lüders (72), Haste, 25.5.83
Arthur Bolle (90), Berlin, 19.7.83
Ili havu eternan pacon.

Por ebligi pli bonan komparon kun pli fruaj raportoj, ni subdividas la jarraporton simile kiel en antaŭaj jaroj. Kaj — bonvolu ne nur legi ĝin (eĉ ĝis la fino), sed provu ekkoni, ĉu ĝi ne instigos vin kunhelpi por pli bona estonteco de GEFA.

1. Organizaj aferoj

1. 1. Membrostato

Denove la membronombro ne kontentige evoluis. Kompare al la antaŭa jaro ni perdis 11 membrojn, do havis 477 individuajn membrojn fine de 1982. Pro tio ni ankaŭ devis malplialtigi la membrokotizojn pagitajn al IFEF, al kiu ni pagis

en 1983 por 802 individuaj plus korporativaj membroj, same kiel unufojan sumon de unu marko po membro por la Historio-Broŝuro de IFEF. Sekve ni ankaŭ por 1983 disponigis 5 komitatanojn al la IFEF-komitato. El la kursoj estis anoncitaj 14 kursanoj finintaj la kursojn. Ĉu la kursestroj zorgis, ke ili ĉiuj membriĝis? Ili nombro eble sufiĉus, por almenaŭ egaligi la perdon por ekŝiĝoj kaj morto. Kursoj necesegas por vivteni la asocion!

1. 2 Kursoj

Jes, kursoj nepre necesas! En printempo 1982 finiĝis kvin lingvokursoj, en 1983 eĉ nur kvar, kiujn supozeble dekdou da personoj partoprenis ĝis la fino, tro malmulte por garantii la vivon de GEFA. Denove ĉiuj, kiuj kapablas instrui, estas insiste petataj fari ĉion por aranĝi kursojn multloke. Estas konate, ke multaj personoj, sed precipe fervojistoj, ne havas okazon, frekventi lokan kurson. Kun ĝojo ni povas konstati, ke la projekto de longe planita tradistanca kurso (Fernlehrgang) de GEFA en ĉi tiu jaro faris grandan paŝon antaŭen, tiel ke oni povas antaŭvidi ĝian baldaŭan aperon. Tiam ĉiu interesulo povos lerni la Internacian Lingvon hejme. Cetere ankaŭ la du lernolibroj „Esperanto — eine lebendige Sprache“ kaj „Konversacia Kurso“ ankoraŭ daŭre estas haveblaj (mendi ĉe la sekretario, vidu Bultenon 2/83).

1.3. Kunlaborantoj

La laborkonsilantaro kunvenis dufoje kun la distriktaĵaj kaj specialaj komisiitoj en Friedberg (Oktobro) kaj Frankfurt (Aprilo). Personaraj ŝanĝoj ankoraŭ ne okazis, sed baldaŭ atendeblas sur diversaj niveloj.

2. Kunlaboro en IFEF

De la 4a ĝis 10a de Junio 1983 okazis la 35a IFEF-kongreso en Ostende, al kiu aliĝis 74 germanoj. Re prezentis nin la komitatanoj Graß, Kiefer, Ritterspach, Schindler kaj Schrapp. G. Ritterspach denove estis elektita sekretario por la Terminara kaj Fakprelega Komisionoj. La redaktado de la „Terminara Kuriero“ restas en la manoj de D. Hartig.

La elstara faka karaktero de tiu kongreso montriĝis en fakaj prelegoj kaj vizito pri la gastlando Belgio, al kies reviziado konsiderinde kontribuis Gernot Ritterspach. Krome aŭdeblis aparta prelego de vic-prezidanto Engen kaj ne laste konciza prezentado de „Aktualaĵoj el via lando“ (7 landoj). La „Kongreso-Bulteno“ (4 numeroj) ĉefe estis la verko de Elisabeth Ritterspach, dum Elfriede Kruse kelkajn tagojn kunlaboris en LKK.

En Majo la prezidanto ĉeestis en Svisio kunvenon de la internacia prepara komitato por la jubilea jaro 1987 kaj denove en Budapeŝt okaze de la UK. En Decembro '82 li kunvenis kun LKK Ostende, en Julio li estis en Bulgario laŭ invito de LKK Burgas por konsili en la preparado de la 36a IFEF-Kongreso.

3. Aranĝoj, kontaktoj

La 26a jarkunveno okazis la 15an ĝis 17an de Oktobro en Friedberg (Hessen) kun 129 partoprenantoj el 6 landoj. Videblis ekspozicio, kiun vizitis 700 personoj. Informstano en la urbo allogis 500 personojn. Rezulto estis nova kurso kun 8 partoprenantoj. Detalaj raportoj en Bultenoj 5/82 kaj 2/83.

Kontraŭe al antaŭa kutimo ni nun devas peti antaŭpagon de la kotizo al jarkunveno, ĉar ĉiam simple ne venis certa nombro de aliĝintaj personoj (en Friedberg 21), eĉ sen anonci tion. Sed preparoj kaj organizado kostas monon. Ni petas komprenemon.

Elstara aranĝo de 22a ĝis 29a de Januaro fariĝis la 24a Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno en Bayrisch-

Eisenstein kun 83 partoprenintoj el 8 landoj. Ĝi iom suferis pro longdaŭra pluvado, sed tio tamen ne povis ĝeni la kutiman etoson. Dankon al la organizintoj kaj helpintoj!

Multaj membroj ĉeestis en la UK Budapeŝt kaj en aliaj naciaj kaj internaciaj aranĝaĵoj.

Pri la kontaktoj al BSW nenio eksterordinara estas dirinda. La afergvidanta por kulturaj aferoj oficisto ĉe BSW-ĉefestraro, Friedrich Bayerath, en somero 1983 emeritiĝis. Antaŭ nelonge ni eksciis pri lia posteulo, Martin Rother, ĝis nun komisiito por la ŝakgrupoj fervojistaj. Kun la sindikatoj la rilatoj daŭre estas bonaj, same al Germana Esperanto-Asocio, Germana Esperanto-Instituto kaj Internacia Esperanto-Muzeo Wien.

4. Informado, varbado

4.1 „Bulteno“ esceptokaze aperis kvarfoje (n-ro 5/82 ĝis duobla 3/4/83). Kaŭzo estis neantaŭviditaj malfacilaĵoj en la presejo, kiuj tiom prokrastis la eldonadon de la tria numero, ke ne plu valoris aperigi apartan n-ron kvar. Entute estis 38 paĝoj kun 9 fotoj. Oni certe rajtas diri, ke „Bulteno“ plenumas sian taskon, esti ligilo inter asocio kaj membraro helpe de siaj vervaj raportoj, societaj novaĵoj kaj informoj aktualaj. Sed la redaktoro nur kapablas liveri adekvatan Bultenon, kiam li regule kaj sufiĉe frue ricevas interesajn kontribuaĵojn. Do, ne hezitu!

4.2 Gazetaro

En la oficialaj Bultenoj de DB (Amtsblätter) konstatablis 9, en tagaj gazetoj 75 publikigaĵoj pri nia laboro, certe kontentiga fakto. En kelkaj fervojaj distriktoj lastatempe aperas komunikilo (Mitteilungen) flanke de BSW. Tio jam kelkloke donis bonvenan okazon lanĉi komunikojn pri nia agado. Laŭ informo de BSW-ĉefestraro oni provos enkonduki tiajn informilojn en ĉiuj distriktoj.

4.3 Varbado, informado

Presado de novaj informiloj provizore ne necesas, ĉar ankoraŭ ni havas provizon. Planite estas post la fiasko de la anonco en „Wir“ iri aliajn vojojn, kiuj tamen devos esti preparataj. El la demandoj responditaj estas videble, ke en kelkaj distriktoj oni serioze klopodas alvenigi novajn adeptojn al nia movado. Tamen la „fako Informado, varbado“ multe pli

kontentige funkcius, se GEFA finfine havus respondecan funkciulon por ĝi. De jaroj ni serĉas bonvolan kolegon, sed neniu pretas transpreni la fakon. La kongresrezolucio de Ostende ni germanlingve publikigis en „Bulteno“ kaj krome sendis ĝin al FISAIC, BSW-HV, sindikatoj kaj kelkaj aliaj instancoj. Reagoj ne konstatitaj. Ankaŭ la fakprelegon ni sendis kiel kutime al multaj interesitoj, bibliotekoj ktp.

La matinea parolado de GEFA-prezidanto Giessner

Mi ne intencas tedi vin per legado de la jarraporto, vi povos legi ĝin en la venonta Bulteno. Mi nur elektu punktojn el ĝi, kvazaŭ la „aktivecojn“. Sed antaŭe mi citas kelkajn inspirajn liniojn el la raporto de Willi Brandenburg pri jarkunveno Friedberg en Bulteno 5/82.:

„Ne nur de hodiaŭ multaj volas havi ion kaj nur malmultaj aktive laboras; tio estas la ĝenerala tendenco de nia postmilita socio. En ĝi ne plu solidare, persone, ame kaj memkompreneble unu zorgas pri la alia, pri sia proksimulo kiel diras la kristanoj. — Ni ne miru, ke triumfas egoismo, ke potencaj fortoj malkaŝe fuŝinforme, ne nur montras, sed per novaj informteknikoj realigas sian intereson, ne klerigi la homon nuntempan, sed manipuli homaron je kiel ajn utiligebla amaso. Ĉu ni ne devas esti feliĉaj, trovi ankoraŭ tiom de individuistoj inter ni, kiuj idealisme pretas sian taskon, starigi sin kontraŭ torentoj de nescio, neglekto, egoismo?“

Tiaj „individuistoj“ ekz. serioze klopodas en kelkaj distriktoj altiri novajn adeptojn por nia fervojista movado. Oni organizis aŭ partoprenis en ekspozicioj — mi nur nomas Friedberg, Schwelm, Offenbach —; oni disdonis centojn da informiloj kaj varbiloj, pendigis afiŝojn, faris prelegojn. En la ĉiutaga gazetaro ni povis konstati 75 artikolojn pri nia agado. Ankaŭ la novaj BSW-komunikiloj, aperintaj en kelkaj distriktoj, jam bone estas utiligitaj por lanĉi informojn pri nia laboro. Ni penetris en la „Inter-Rail“-prospekton de DB. Rezolucio kaj fakprelego de Ostende estas senditaj al interesitaj instancoj, bibliotekoj, muzeoj ktp. Ĉi-konekse mi memorigas je la senbrua laboro, kiu daŭre okazas malantaŭ la kulisoj en la IFEF-

5. Emerituloj

La ĉi-jara renkontiĝo de la emerituloj okazis la 10an de Septembro en Hannover. La agrabla kadro por la 37 geparto-prenantoj estis salono en la stacidoma restoracio. Kun viglaj babilado kaj diskutado rapidege forflugis la tempo. Ĝenerala deziro: Venontjare denove. Dankon al Elfriede Kruse, kiu kiel ĉiujare prizorgis la „administran parton“. Rimarkinde, ke tio estis la deka tiaspeca renkontiĝo. **kompilis Giessner**

komisionoj terminara, fakprelega kaj historia, en kiuj GEFA-anoj decide kunlaboras.

Jes, aktivecoj, multnombraj, rezultoplenaj. Ĉiuj tiuj homoj meritas dankon. Ili devas kontentiĝi pri tiu danko, kontentiĝi pri la sento, ke ili ĝuste agas, ke ili kontribuas al afero nobla, paceca.. Ili devas kontentiĝi en la scio, ke ili agas en la senco de d-ro Zamenhof.

Kaj tamen! Tiuj malmultaj solaj ne povas savi la situacion, ĉar la plej multaj nur volas „havi“, ĝui, eble kritiki. Pli kaj pli ni glitas al la stato de malgranda asocio. La plej multaj neniam havas tempon, kaj tamen havas tempon por la moderna malamiko de la familia vivo kaj de ĉiu krea agado: por la televido. Certe ankaŭ estas aliaj kluboj kaj societoj, kiuj postulas siajn rajtojn, prave. Kaj tamen estas diferenco, ĉu oni donas siajn fortojn por pli malpli persona plezuro aŭ por la humaneca tasko, kiun ni elektis apud nia profesio. Jes, humaneca tasko! Ĝi servas al la homaro entute, al la progreso de la homaro, sen kontraŭpostuloj. Tiu tasko meritas, sed ankaŭ kondiĉas sindonemon. En niaj vicoj troviĝas sufiĉe da homoj, kiuj kapablus kontribui ion el tia sia sindonemo. Kaj kiel jam hieraŭ en la laborkunsido mi devas atentigi, admoni, peti vin, ke vi venku ĉiujn ajn skrupulojn kaj sen hezito deklaru vin pretaj transpreni necesajn taskojn.


Ekzemple ni bezonas bonvoleman kolegon, kiu transprenos la funkcion de respondeculo por informado, varbado, kaj en ĉiuj distriktoj necesas homoj, kiuj aranĝos kursojn.

Solvoj estas trovendaj kaj ili certe troveblas, se bonvolo kaj sindonemo regas.

GEFA kore gratulas al Joachim Giessner pro la 70-jariĝo (23-XII)!



1958



1977



1982

Fotoj: Ritterspach

La bildoj ilustras, ke li de longe scias verve paroladi (1958), ke li kapablas kanti, eĉ kantigi (1977) kaj ke li lernis fari paŭzon dum la laboro (1982). Jen bonegaj kondiĉoj por la venonta jardeko!

36. IFEF-Kongreß Bulgarien Flugkarawane – Liegewagen

(bitte aufmerksam bis zum Schluß lesen)

Ergänzend zu unserer Mitteilung in Bulteno 3/4 83 Seite 11 geben wir hiermit folgendes bekannt:

GEFA wird eine Flugkarawane organisieren. Die Flugzeuge fliegen am Donnerstag, den 10.5.84 direkt nach Burgas und starten ab Burgas zurück jeden folgenden Donners-

tag. Es können also eine, zwei oder mehr Aufenthaltswochen gebucht werden. Preise für Flug einschl. Vollpension in Hotelzimmern mit Dusche/WC (Einbett- oder Zweibettzimmer gleicher Preis pro Bett) pro Person für eine Woche 590 DM, zwei Wochen 770 DM, drei Wochen 950 DM. Das vorgesehene Hotel (2 Sterne) liegt

nahe dem Kongreßgebäude und etwa 5 Minuten vom Strand. Die Preise gelten für Abflug von München. Bei Abflug von Frankfurt/M oder Düsseldorf erhöhen sie sich voraussichtlich um 40 DM, bei Abflug von Hannover oder Hamburg um 60 DM. Die Preise für die Flug- und Liegewagenreise konnten aufgrund einer neuen Kalkulation des Reiseveranstalters gegenüber den im „Internacia Fervojisto“ veröffentlichten Beträgen nochmals gesenkt werden. Sie enthalten in jedem Falle auch den Transfer zum und vom Hotel in Suna Bordo (45 km). Die im IF veröffentlichten Preise werden in dessen nächster Nummer mit vorstehenden Preisen in Einklang gebracht.

Bestellungen für den Flug bitten wir bis spätestens 31.3.84 an den IFEF-Sekretär zu richten. Anschrift: Otto Rösemann, Ringstraße 14D, 3067 Lindhorst, oder als EDS an BAmtm Rösemann -Bf 52 - 300 BD Hannover. Für später eingehende Buchungen können wir keine Flug- und Hotelvormerkung garantieren. Am besten senden Sie Ihre Bestellung **möglichst bald** ein, damit wir Flug- und Hotelplätze reservieren lassen können. Bitte geben Sie dabei an: Familien- und Vornamen, vollständige Anschrift, Nummer des Reisepasses, ob Einbett- oder Zweibettzimmer gewünscht (evtl. mit wem zusammen), Name des Abflughafens, ob Teilnahme am Ausflug nach Istanbul gewünscht (unverbindlich). **Die Bestellungen werden endgültig und verbindlich bearbeitet, wenn der Betrag auf folgendem Konto eingegangen ist:** Otto Rösemann (Reisekonto), D-3067 Lindhorst, Sparda-Bank Hannover, Konto 921 947 (Bankleitzahl 250 905 00). Zur Arbeitserleichterung bitten wir Sie um Einzahlung bis 29.2.84, spätestens jedoch bis 20.4.84. Falls jemand, der bereits bezahlt hat, die Reise nicht antreten kann, erhält er bei Abbestellung bis 20.4. den gesamten Betrag zurück. Bei späterer Abbestellung müssen wir die uns entstehenden Unkosten einbehalten.

Jeder Teilnehmer erhält am Kongreßort Slančev Brjag (Suna Bordo) sogenannte Talons im Werte von 11.50 Lewa=etwa 20 DM pro Tag. Diese kann man in allen Restaurants für Speisen und Getränke in Zahlung geben.

Nach den augenblicklich gültigen Bestimmungen müssen Einzelreisende sich vor

Abreise in Deutschland ein Visum besorgen (Kosten 31 DM + Versandkosten). Teilnehmer der Flugkaravane brauchen vorher kein Visum, sondern erhalten es kostenlos bei der Ankunft in Burgas. Sie müssen jedoch einen gültigen Reisepaß mitführen.

Diejenigen, die zwei Wochen oder länger buchen, haben Gelegenheit, nach dem Kongreß an einem von „Balkantourist“ angebotenen Busausflug nach Istanbul teilzunehmen. Er dauert vom Sonnabend, 19.5. früh bis Dienstag 22.5. abend. Preis 120 Dollar, zu zahlen in westlicher Währung an Ort und Stelle. Dafür werden geboten Fahrt im Bus, Vollpension und Programm in Istanbul. Zwei zusätzliche örtliche Ausflüge werden außerdem angeboten, nämlich „Istanbul bei Tag (12 Dollar) und „Istanbul bei Nacht“ (15 Dollar). Zahlbar ebenfalls am Kongreßort. Bestellungen können voraussichtlich auch noch in Suna Bordo berücksichtigt werden. Vorstehende Information wurde von Angestellten des „Balkantourist“ in Slančev Brjag gegeben. Die Angaben im Aliĝilo weichen davon ab. Der Preis für Flug+Hotel ist so günstig, daß es nicht wesentlich ins Gewicht fällt, daß man 3 Nächte in Suna Bordo abwesend ist, für diese aber bezahlt.

Für Kongreßteilnehmer, die **mit der Bahn** fahren wollen, schlagen wir eine gemeinsame Reise im **Liegewagen** vor. Diese würde durchgeführt im „Istanbul-Expresß“ D 293, mit Abfahrt in München am Donnerstag, dem 10.5.84 um 17.34 Uhr, Ankunft in Burgas am 12.5. um 5.22 Uhr. Voraussichtlich würde ein Wagenwechsel in Sofia notwendig. Der Zuschlag für Liegeplatz bis Burgas (2 Nächte) beträgt 31,- DM.

Falls genügend Interessenten vorhanden sind, sehen wir für die Rückreise folgenden Plan vor: Burgas ab im Liegewagen am Sa, 19.5. um 22.44 Uhr, München am Montag 21.5. um 12.18 Uhr, ebenfalls mit „Istanbul-Expresß“. Preis gleichfalls 31 DM. Selbstverständlich ist es jedem überlassen, die Rückreise nach eigener Planung vorzunehmen. Auch für die Teilnehmer der Liegewagenfahrt können wir Hotelzimmer zu gleichen Bedingungen wie für die Fluggäste reservieren lassen. Preis für eine Woche 250 DM, für jede weitere Woche 180 DM. Aus technischen Gründen müssen die Bestellungen für Liegewagen und evtl. Hotelreservierung bis **spätestens 29. Februar** bei Otto Rösemann eingegangen sein.

Aber auch hier bitten wir um möglichst frühe Buchung. Den zu zahlenden Betrag erbitten wir ebenfalls bis 29.2., spätestens jedoch bis 20.4. an das gleiche Konto wie für die Fluggäste. Teilnehmer der Liegewagenfahrt erhalten ebenfalls das Visum bei der Einreise nach Bulgarien, müssen aber einen gültigen Reisepaß bei sich führen. Wer ein Hotelzimmer bucht, erhält Talons im Werte von 11.50 Lewa pro Tag. Die Bestellungen müssen enthalten: Familien- und Vornamen, vollständige Anschrift, Nummer des Reisepasses, Zahl der gewünschten Liegeplätze (ob nur Hinfahrt oder auch zurück), ob Ein- oder Zweibettzimmer im Hotel gewünscht, ob Teilnahme am Ausflug nach Istanbul gewünscht (unverbindlich).

Wir machen hiermit nochmals darauf aufmerksam, daß der **Kongreßbeitrag** von **deutschen** Teilnehmern -wie im Bulteno 3/4/83 bekanntgegeben - **an GEFA, Konto 953 729** bei Sparda-Bank Frankfurt/Main **einzuzahlen** ist, das **Aliĝilo** dage-

gen direkt an die im Aliĝilo angegebene Adresse des LKK in Bulgarien zu senden ist. GEFA verständigt das LKK von der Einzahlung. Bei einem Umrechnungskurs des Dollars von 2.70 DM beträgt der Kongreßbeitrag bis 29.2.84 = 75.60 DM bzw. 37,80 DM bzw. 91,80 DM bzw. 13,50 DM. Sollte sich der Umrechnungskurs um mehr als 10 Pf nach oben oder unten ändern, wären entsprechende Beträge zu überweisen.

Die mit Bulteno 3/4/83 auf Seite 11 abgedruckte „Vorbemerkung“ wird hiermit hinfällig.

Weitere Informationen folgen, sobald die neuen Flugpläne bekannt sind. Die Reisepapiere werden den Bestellern nach dem 20.4. rechtzeitig zugesandt.

Die im Aliĝilo angebotenen Kongreßausflüge bestellen Sie bitte zu den dort aufgeführten Bedingungen.

GEFA

■ > **LETZTE MELDUNG** < ■

Alle Kongreßausflüge können – abweichend vom Aliĝilo – in Slančev Brjag bezahlt werden.

Nekrologo

La 19an de Julio 1983 ni perdis nian plej aĝan membron,

Arthur Bolle (Berlin).

Li naskiĝis en Berlin la 15an de Junio 1893, lernis Esperanton jam 1921 kaj aktiviĝis en Berlin en la tiea esperantistaro ĝis 1933. Tiam li perdis sian okupon ĉe Deutsche Reichsbahn ĝis 1945 kaj post redungado denove estis eksigita el la fervoja servo ĉe Deutsche Reichsbahn en 1949 pro similaj kaŭzoj kiel 1933. Kelkfoje li estis inter ni en la pasintaj jaroj okaze de emeritulaj renkontiĝoj. Ni perdis fidelan amikon kaj kondolencas al la familio.

GEFA

Aus den Gruppen

Essen / Dortmund

Die erste Ausstellung der deutschen und internationalen Arbeiter-Esperanto-Bewegung wurde erfolgreich der Öffentlichkeit im Auslandsinstitut zugänglich gemacht. Unter dem Titel „Den Arbeitern aller Länder eine Sprache – Zur Geschichte der internationalen Arbeiter-Esperanto-Bewegung 1903 – 1983“ wurden wertvolle historische Dokumente, Bilder und Bücher gezeigt. Unser Mitglied Günter Bartz hat Teile seiner reichhaltigen Sammlung zur Verfügung gestellt und sich aktiv an den Vorbereitungen beteiligt und sich für die Durchführung zur Verfügung gestellt.

Die Bewegung kann mit Ausnahme der Kriegsjahre auf eine ununterbrochene Tätigkeit zurückblicken. Nach dem Krieg, im Juli 1946, fand sich wieder eine kleine Gruppe Arbeiter und Intellektueller zur

Gründungskonferenz der Dortmunder Esperanto-Gruppe zusammen.

Ende vergangenen Jahres veranstaltete der Esperanto-Kreis einen Dia-Abend mit einer bulgarischen Esperantistin, die für ihr Heimatland und die internationale Ferienschule in Pisanica inmitten der reizvollen Landschaft der Rodopen warb. Nähere Informationen sind beim Esperanto-Kreis der RWAG erhältlich.

Rückblick auf die Veranstaltungen von April/Mai 1983:

11. 4. Dia „Tradiciaj kutimoj kaj festoj en Japanio“,

25. 4. Weiterbildungsabend, 9. 5. Tonbildschau – In 5 Tagen auf den Kilimanjaro.

Duisburg

Seit Anfang des Jahres werben wir für Esperanto und für unseren Kreis im verstärkten Maße. Es begann mit einer Reportage der Mannesmann-Werkszeitung über die Freizeitbeschäftigung unseres „Klubpräsidenten“ Herrn Nitsche. Wir beschlossen etwas zu tun, um Esperanto bekanntzumachen.

Wir berichteten unseren Tageszeitungen über Briefverbindungen mit Esperantisten unserer Patenstadt Wuhan, VR China, über die Teilnahme von Mitgliedern an Kongressen, über Ausländerbesuche, hauptsächlich aus „exotischen“ Ländern. In den Zeitungen erschienen zuerst kleine Notizen und dann halbseitige Berichte.

Auf dem Jahresfest der Volkshochschule warb Herr Nitsche mit einem Stand. Einige Pfarrfeste haben wir mit einem Stand besucht. In der Universität und in den Studentenwohnheimen hängen Plakate über Esperanto. Keine Dienststelle der Bundesbahn haben wir vergessen.

Höhepunkt der Werbung war die 1100-Jahrfeier der Stadt Duisburg. Die Stadt gab allen Vereinen Gelegenheit, sich selbst darzustellen. Die Verwaltung stellte jedem Interessenten einen Stand zur Verfügung. Diese Gelegenheit ließen wir uns nicht entgehen. Wir haben unseren Stand mit viel Phantasie, Arbeit und Können zu einem der schönsten ausgestaltet. Unsere „Marktbude“ stand an einer günstigen Stelle. Nach Zeitungsberichten wurde die Veranstaltung, die drei Tage dauerte, von ca. 600 000 Personen besucht. (Bundespräsident Carstens und NRW-Ministerpräsident Johannes Rau waren Gäste.)

Der in der anschließenden Woche im Unterrichtszentrum des Duisburger Hauptbahnhofes begonnene Esperantokurs wurde von zwanzig Teilnehmern belegt. Den größten Erfolg kann wohl Herr Nitsche jr. für sich verbuchen. Es gelang ihm, als Schüler der 10. Klasse des Hildegardgymnasiums, einen Arbeitskreis für Esperanto zu gründen. Es meldeten sich 40 Schülerinnen und Schüler.

Frankfurt/Main

Die „Frankfurter Neue Presse“ berichtet mit einer Abbildung „Esperantostraße“, die 1976 im Stadtteil Sachsenhausen eingeweiht wurde, unter dem Titel „Im Zeichen des fünfzackigen Sterns“ über Geschichte und Entwicklung der Internationalen Sprache.

Jahrestagung der Rhein-Main-Esperanto-Liga und Esperanto-Gruppen im Bundesbahnsozialwerk Frankfurt am 26. 6. 1983

Die Mitglieder der Esperanto-Gruppen im Bundesbahn-Sozialwerk Frankfurt und der Rhein-Main-Esperanto-Liga (Dachorganisation der örtlichen Esperanto-Gruppen im Rhein-Main-Gebiet) trafen sich am Sonntag, 26. 6. 83 im Kolpinghaus Offenbach zur Jahresversammlung.

Das Programm bot aktuelle Berichte und Informationen und einen Dia-Vortrag über Kunst und Sprache der Etrusker.

Aus den Berichten ging hervor, daß Mitglieder der beiden Vereinigungen an zahlreichen internationalen Treffen, Ferienwochen und Kongressen teilnahmen.

Durch ein Interview mit dem Hessischen Rundfunk und Mitgliedern der Esperanto-Gesellschaft Frankfurt und Offenbach ergaben sich Informationsanfragen und Anstöße zur weiteren Arbeit.

Neue Impulse erhielten die hiesigen Esperanto-Freunde auch durch den 61. Deutschen Esperanto-Kongreß, der über Pfingsten in Bad Säckingen stattfand. Im Mittelpunkt des Kongresses stand die Ablösung des bisherigen Bundesvorstandes durch eine jüngere Mannschaft. Prominentester Teilnehmer war Prof. Dr. Ye von der Universität Nanking/China; z. Zt. Gastwissenschaftler an der Uni München, dessen Land sich für 1986 um den Esperanto-Weltkongreß bewirbt.

Nach dem vorgesehenen Arbeitsprogramm sollen zum Jubiläumsjahr 1987 (100 Jahre Esperanto) die örtlichen Gruppen aktiv einbezogen werden. Weitere Aktionen werden der Europawahl 1984 und dem Esperanto-Weltkongreß 1985 in Augsburg gelten.

Die Mitglieder der Rhein-Main-Esperanto-Liga und Esperanto-Gruppen im Bundesbahn-Sozialwerk werden sich aktiv am nächsten Deutschen Esperanto-Kongreß in Kassel beteiligen.

Hannover / Bremen:

Am 20. 4. fand der Esperanto-Diskussionsabend im Gemeindehaus Walle statt, am 9. 2. die Jahresversammlung. Am 7. 5. wanderten die Mitglieder durch das Wümme-Tal zum Modersohn-Haus nach Fischers-hude. Am 8. 6. wurden Interessenten über „Informatik für Laien“ durch das Mitglied Franz Kruse informiert. Am 2. 10. folgten die kontaktfreudigen Mitglieder einer Einladung der niederländischen Freunde in das Naturfreundehaus „De Hondsrug“ in Nordlaren bei Groningen. Die Kontakte aus dem Jahre 1979 wurden erneuert, erweitert und vertieft.

Weitere Aktivitäten, 7. 9.: Dieter Hartig, Diskussionsvortrag über Fachwort-Lexikologie. Behandelt wurde die Übersetzungsarbeit an einem Eisenbahn-Fachwörterbuch. Am 21. 9. und 23. 11. kam jeweils die Esperanto-Diskussionsrunde im Hbf zusammen. Am 19. 10. sprach das Mitglied Coburger in einem Lichtbildervortrag über die „Römer in Deutschland“, insbesondere über die Rekonstruktion der ehemaligen Römersiedlung Cut bei Xanten/Niederrhein. Neue Kurse für Anfänger und Fortgeschrittene begannen am 21. 9. d. J. Unterrichtet wird nach dem Hartig-Lehrbuch „Esperanto – eine lebendige Sprache –“, 2. Auflage.

Nürnberg

Der Esperanto-Arbeitskreis Kronach begann am 22. 9. 83 Kurse für Anfänger und Fortgeschrittene in der Volkshochschule. Auskunft erteilt: Armin Grötzner, Gehülz-Gießübel, 8640 Kronach, ☎ 0 92 61 / 16 21.

Esperanto zweite Fremdsprache

Die führende chinesische Zeitung „Gungming Ribao“ (La lumo = das Licht) berichtete, daß mit Erlaß des Erziehungsministeriums der Volksrepublik China vom

16. 12. 1982 die schon durch ein früheres Dekret bestehende Möglichkeit des Schul-Wahlunterrichts in Esperanto erweitert und auf die Hochschulen ausgedehnt wurde.

Ab jetzt kann Esperanto als offizielles Studienobjekt gewählt werden, es kann für Diplome, „Forschungs-, Examens- und Promotionsarbeiten verwendet werden. Man legt vor allem Wert auf eine „Wissensvermittlung zur Unterrichtung von Esperanto“, um die sich mehr und mehr im In- und Ausland verbreitende Esperanto-Kultur zu pflegen, Esperanto-Mitarbeiter heranzubilden und die weitere Verbreitung der Internationalen Sprache in China zu fördern.

Diese Veröffentlichung erschien auch in „EL POPOLA ĈINIO“ 3/83 (S. 53), einer vom Chinesischen Auslandsverlag herausgegebenen Zeitschrift in Esperanto. Damit wurde Esperanto offizielle, vollberechtigte zweite Fremdsprache im Hochschulbereich und bei Staatsexamen.

Fervoje vojaĝi en Ĉinio

En la popola respubliko Ĉinio la fervojo estas la plej grava trafikilo kaj por turistoj multe pli interesa ol la aviadilo. Ekzistas du klasoj, la dura kaj la mola. Eksprestrajno kondukas ankaŭ duklasajn litvagonojn. La dura klaso disponas pri po tri kuŝlitoj en unu kupeo, malferma al la koridoro, do sen pordo. La unua klaso estas iom pli komforta. La kupeo havas kvar litojn, tableton ĉe la fenestro, kruĉon kun varmega akvo por la memservita teo kaj koridoran pordon. Unu tamen mankas: papero en la necesejo. La pasaĝeroj devas ĝin mem kunporti.

En la ĉefstacidomo de Pekino kun amaso da giĉetoj eĉ ne unu indiko en fremda lingvo estas videbla. Kiu esperas, ke malantaŭ la giĉeto iu fervojisto scipovas balbuti anglalingve, vane atendas tion. Biletoj estas vendataj nur por la sama kaj la sekva tago. Kiu nur poste intencas ekveturi, devas ankoraŭfoje envicigi. Sed kie? Ĉiu giĉeto estas kompetenta nur por certaj destinaĵoj. Ili estas indikitaj super la giĉeto ĉinalingve.

Eksterlandanoj principe pagas pli altan veturprezon ol ĉinoj. Laŭ la oficiala informo la ŝtato subvencias la fervojan trafikon. Ĉinoj pagas ekzemple por litvagona

vojaĝo en la unua klaso inter Pekino kaj Kantono 132,80 Juan (173 DM), dum de la turistoj oni postulas 205 Juan (267 DM). Tio egalas por la 2 313 km longa trako al kilometra veturprezo de 11,6 fenigoj — tamen malmultekosta kompare al la veturprezoj de la Germana Federacia Fervojo.

W. B.

Antentu, estraranoj kaj komisiitoj!

La kutima printempa kunveno okazos Sabaton, la 24an de Marto, antaŭvideble en Würzburg. Bonvolu noti la daton. Informoj sekvos.

pr

Atentigo

La komisiito por gazetaraj aferoj de GEA (letero de leganto), ĝis nun d-ro Rudolf Fischer, estas nun Karlheinz Schlottbohm, Am Birkenkamp 28, 4030 Ratingen 5, tel. (0 21 02) 1 81 23.

Süßer die Glocken nie klingen

Dolĉe de l' tur' sonoriloj

Teksto: Friedrich Wilhelm Kritzinger (1816 — 1890) Melodi-origino nekonata

Traduko: Joachim Giessner

1. Dolĉe de l' tur' sonoriloj
vokas je kristnaska grac',
kvazaŭ anĝelaj jubiloj
sonas pri ĝojo kaj pac'.
[: kantis en nokto beata de Di' :]
Sankte la son' tra l' aer'
flugu al tuta la ter'.
2. Ho, delikata la sono,
aŭdas ĝin jam kristinfan'.
Urĝas de l' ĉiel' al la tono,
gracon por homoj en man'.
[: Benon por patro, patrin' kaj infan' :]
Sankte la son' tra l' aer'
flugu al tuta la ter'.
3. Sonu en montoj, sur maro,
sonu je dia honor',
ĝoju la tuta homaro,
festu en laŭdo kaj glor'.
[: Homoj jubilas, ĝojkantas tra l'mond' :]
Sankte la son' tra l' aer'
flugu al tuta la ter'.

Soveta Unio:

Triono de la fervoja reto sub katenario

Plua elektrizado de la soveta fervoja reto ankaŭ ĉi-jare flue antaŭeniras; sole en 1981 oni sur 600 kilometra relvojo enkondukis elektran traktion. La nuna elektrizita fervoja reto de la SZD ampleksas pli ol 50 100 km, tio estas 33% el la tuta liniaro. Sur ĝi estas jam transportataj 55% el la komuna trafik-kiomo. Depost 1975 oni ne nur konstruadis je kroma 3500 kilometra nova relvojo, sed finpretigis ankaŭ 4500 km da trakoj por elektra traktio.

BAM-relvojo longas 1600 kilometrojn

Sur la nova 1600 kilometra Baikal-Amur-Linio (BAM) la trafiko nun fine funkcias. Trajnoj ruliĝas inter Tynda, Berkakit kaj Ugolnaya kiel ankaŭ inter Tynda kaj Ust-Njukuŝa. La 264 kilometra lini-sekcio Ust-Kut-Kunerma estos antaŭvideble preta por regula trafiko ĉe jarfino.

El „Blickpunkt“ 1/82
Busse

Bona Espero

teilt mit, daß die Bewohner sich vorgenommen haben den, Esperanto-Charakter der Farm zu unterstreichen und aus diesem Grunde die vorhandene Bibliothek zu erweitern.

Da keine Mittel hierfür vorhanden sind, wird eine Esperantobücher-Spende erbeten. Auskunft: Barbara Brandenburg, Dt. Botschaft Bagdad, Postfach 1500, 5300 Bonn 1.

Die Lehrbücher

„Esperanto — eine lebendige Sprache“ und „Konversacia Kurso“ sind einzeln für 7,— DM und zusammen für 12,— DM + Versandkosten (soweit nicht EDS möglich) beim GEFA-Sekretär Joachim Schropp, Münster/Westf. (Anschrift siehe Bulteno 1/83) erhältlich. Das preisgünstige Angebot sollten Sie ausnützen.

Redaktfino por n-ro 1/84 estas la 15.1.84.

Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝojigan Kristfeston kaj sukcesplenan Novan Jaron.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr. 7. Druck / presado: Druckerei Friedrichs, 3420 Herzberg am Harz